



Estrara Komunikado EKO 2017-22 sendita el Budapeŝto, la 10an de aŭgusto.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

Alvoko por kursanoj

Ene de mallonga tempo finiĝos la aliĝperiodo al la trijara kursaro de la Interlingvistikaj Studoj en Poznan. La programo postulas perretan laboradon de distanco, kune kun sep vizitoj al Poznan (du ĉiujare plus unu kursfina vizito). Aliĝis jam dudeko da personoj el diversaj mondpartoj kaj landoj. Preskaŭ ne tro malfruas, ke ankaŭ vi aliĝu al tiu unika studgrupo. Iru al: <http://www.amu.edu.pl/~interl/>

Ĉi tiu studprogramo montras, ke konstruitaj lingvoj havas valoron kaj indas je universitat-nivela esplorado. Tre gravas por nia tuta komunumo, ke prosperu la programo.

Alvoko por subtenoj

Naŭ el la kandidatoj petis studstipendion kaj ankaŭ pluraj aliaj bezonos subtenon por dum tri jaroj financi vojaĝojn, vivkondiĉojn kaj aliajn elspezojn. Ni bezonas jare plurmil eŭrojn. La usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation* (ESF) duobligas ĉiun tiucelan donacon. Bonvolu vidi la detalojn, prenitaj el la retejo de ESF.

AMU Poznanon

ESF jam de jaroj finance subtenas la Interlingvistikajn Studojn en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando). Ĉi-jare ESF planas donaci pli ol antaŭe kaj instigi aliajn homojn fari la samon. Por helpi realigi tion, ESF lanĉas kampanjon "AMU Poznanon", laŭ kiu la fondaĵo duobligos viajn donacojn al tiu unika programo: por ĉiu eŭro (dolaro, eno, realo, ktp.) donacita de esperantistoj al la Interlingvistikaj Studoj en Poznano, ESF aldonos samvaloran donacon, tiel ke la komune kolektita sumo atingu \$5000! Do, se vi donacos 10 eŭrojn kadre de tiu ĉi kampanjo, ESF donacos pliajn 10 eŭrojn, kaj se vi donacos 100 eŭrojn, ESF aldonos 100 pliajn eŭrojn al la programo, ktp. Do, anstataŭ la planitaj \$5000 nur de ESF, la programo povas ricevi aldonajn \$5000 pere de VIA donaco, duobligita de

ESF. Tiel, via donaco al la kampanjo 'Amu Poznanon' helpas subteni tiun unikan programon per \$10 000, entute. Sube: studentoj el la surloka vizito en 2016. Foto: smg



Jen tri citoj pri la programo:

“Amu tiun ĉi universitaton! Ĝi estas unika, ĉar ĝi proponas interlingvistikajn studojn, pri kio ne povas fanfaroni multaj aliaj landoj” (gvidanto de la programo, profesoro Ilona Koutny).

“Nur en tiu programo eblas klerigi niajn aktivulojn ĝis la grado, kiun oni povus atendi de la homoj de 21a jarcento, kiuj ambicias ŝanĝi la mondon” (UEA-prezidanto kaj ESF-estrarano Mark Fettes).

“Tiu kurso montris al ni ke Esperanto estas fenomeno multe pli riĉa ol ni povis imagi” (Ivan Colling, Brazilo, esperantisto de 27 jaroj kaj docento pri inĝenier-arto de universitato de Paranao kaj studento de la programo)

Vi povas donaci rete (esperantic.org/amu) aŭ per la UEA-konto: **esfo-p** (donacante per UEA, skribu al financoj@co.uea.org kaj nepre menciu 'por AMU Poznanon', kaj samtempe sciigu al admin@esperantic.org pri la farita donaco) – en ambaŭ kazoj ESF faros egalkvantan donacon. Interlingvistikaj Studoj kaj ESF esperas je via partopreno kaj via malavareco... duobligita!

Vortoj: 415

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/).

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>

ALDONU VIN: Skribu al stefan.macgill@gmail.com. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, kabeintoj, klingonemuloj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.